

BULTENO de REU

OFICIALA INFORMILO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO
№ 96, Aprilo 2018

RUSIAJ ESPERANTO-TAGOJ – 2018 (RET-2018)



Dua informilo

Dato: 01-09 de julio 2018.

Loko: urbo Ŝujo, Ivanova gubernio, ripozejo Daĉa “BOR”, popola nomo “Neburĉilovskaja Daĉa”.

Temo: Generacioj de Esperanto-movado.

Provizora programo: Diskuto pri la ĉefa temo, Somera Universitato, lingvaj kursoj, Instruista seminario, diskutoj, Ronda Tablo pri lingvaj kaj movadaj problemoj, ludoj, kvizoj, koncertoj, ekskursoj, sportumado, libroservo, konkursoj, naĝado, boatado kaj ĉio alia laŭ via plaĉo.

Loĝkondicho: lignaj dometoj kun ĉambroj por 2-3 personoj (kun duŝo kaj necesejo), ĉe bezono eblas aldoni plian lito.

Ekzistas unu domo kun oportunaĵoj ekstere.

En la ĉefa bona duetaĝa domo ĉambroj por 5-6 personoj, oportunaĵoj en la koridoro.

Prezroj: baza prezo pro persono/diurno = 1200 rbl inkluzive matenmanĝon. Aldona lito en lignaj dometoj (kondiĉe ke ĉiuj bazaj lokoj estos okupitaj) = 800 rbl; en la domo sen oportunaĵoj = 600 rbl; en la bona duetaĝa domo = 700 rbl. Ĉiuj prezroj enhavas matenmanĝon.

Manĝado: en la bona domo en la unua etaĝo, tagmanĝo + vespermanĝo = 500 rbl tage.

Planataj ekskursoj dum RET:

tra la urbo Ŝujo, vizito de fama produktejo “Ŝujskaja vodka” (kun gustumado), muzeo de sapo, landesplora muzeo, leviĝo al la plej alta en la eksa Sovetunio katedral-kampanilo, Nikolĉartoma monaĥejo;

ekskurso al la muzeo de K.Balmont, lia naskiĝloko Gumniŝĉi, lokoj, ligitaj kun lia lernado kaj vivo, literatura vespero dediĉe al li kun partopreno de lokanoj;

vizito al urbeto Paleĥ – mondkonata centro de produktrado de ikonoj kaj lakaj miniaturoj.

Vetureblecoj: urbo Ŝujo atingeblas per trajnoj el Moskvo, Sankt-Peterburgo, Niĵnij-Novgorodo. Nun ekfunkciis de Kurska stacidomo (Moskvo) rapida luksa trajno “Hirundo”, kiu veturas 3 horojn 15 minutojn kaj haltas en Ŝujo. Bileton (rean) vi povas aĉeti antaŭ 90 tagoj, aĉeto de bileto al la matena trajno “Hirundo” Moskvo-Ivanova dume por datoj post 12.06 ne eblas, poste la ebleco renoviĝos.

Buse el Moskvo de busa stacidomo Ŝĉelkovskij, daŭro ĉ. 6-7 horojn.

Eblas veturi trajne kaj buse ĝis u.Ivanovo, de kie ĉiujn 20 minutojn veturas busoj al u. Ŝujo.

En Ŝujo ĝis la bazejo eblas preni taksion, tempodaŭro 20-30 minutojn, aŭto kostas 200 rbl. Se kolektiĝos granda grupo, venonta pli-malpli en la sama tempo, estos organizota buso. Ekzistas loka buso Ŝujo –Dunilovo, funkcia 4-foje tage. Bv. peti halti ĉe la haltejo Korovino, post

50 m. estos montrilo “Daĉa “Bor”. Maldekstriĝu de la ĉefa ŝoseo kaj paŝu nehaste 1 km. Bonvolu anticipe anonci pri via veno, ni komunikos numeron de la koncerna taksio, se vi ĝin bezonos.

Aliĝkotizo kaj partoprenkotizo: aliĝo ĝis la 15 de majo por REU-membroj kostas 1200 rbl., por nemembroj – 1500 rbl. Post tiu dato la kotizo altiĝos je 100 rbl.

La partoprenkotizon por loĝado dezirindas antaŭpagi 50% ĝis la 20 de majo. Por manĝado oni pagos surloke.

Ĉiujn pagojn bonvolu ĝiri, transdoni al la kasisto de REU Aleksandro Lebedev kun indiko por kiu kaj kiom vi pagas.

Ni atendas kaj antaŭĝojas viajn kontribuojn por la programo, dankas vin pro la aligo kaj akurata antaŭpago!

Bonvenon al la malnova urbo Ŝujo, kiu ne lasos vin indiferenta! Vi perfekte ripozos kaj kunprenos parteton de ĝia ĉarmo en viaj koroj kaj animoj!!!

Organiza komitato de RET

Gratulojn al Vladimir Samodaj!

La 10-an de aprilo plenumiĝis 60 jaroj post la momento, kiam Vladimir Samodaj konatiĝis kun la lingvo Esperanto. De la nomo REU ĝia Estraro sincere gratulas tiun de ĉiuj flankoj elstaran personon okaze de bela dato kaj publikigas intervjuon kun li.



1. 60 jaroj estas longa periodo, la komenco jam estas en nebulo... Tamen, kio instigis vin tiam, en 1958, lerni Esperanton?

Tiam mi loĝis en Odeso, laboris en ŝiripara uzino, estante takelisto (такелажник), kaj post la laboro preskaŭ ĉiutage vizitadis librovendejojn. En unu el la librejoj mi ekvidis anoncon pri funkciado de kurso por lernado de internacia lingvo. Mi tre interesiĝis pri la afero, vizitis la kurson (estis jam pli ol la unua leciono), eksciis, ke oni studas Esperanton, kaj... tiel komenciĝis mia 60-jara esperantistado.

2. Kial vi daŭrigis okupiĝi pri la afero? Ĉu vi kredis tiam je solvo de la lingva demando pere de Esperanto? Kaj se jes, ĉu vi plu tion kredas?

Al mi plaĉis la ideo komprenigi diverslingvanojn, mi kredis, ke la afero estas solvebla. Nun mi kredas, ke teorie la tasko plenumebblas, tamen la mondo ne pretas al tio. Unue, ĉar plejparto de la homaro ne sentas por tio bezonon, aliaj ne kredas, pliaj ne scias, iuj sentas en Esperanto danĝeron. Ekzistas pluraj obstakloj...

3. Kiujn viajn atingojn en via esperantista agado dum tiu tempo vi opinias la plej gravaj? Pri kiuj el ili vi vere fieras?

Mi sukcesis plenumi kelkajn unikajn iniciatojn por la nialandaj tiutempaj kondiĉoj – veturigo en eksterlandojn (Hungario, Pollando) de neesperantista studenta teatra studio kun spektaklo en Esperanto, konvinko de ŝtatoficistoj eldonadi E-suplementojn al la anglalingva versio de «Moskvaj Novajhoj», miaj faroj en E-Komisiono, SEJM, ASE, SEU, eldono de la provnumero de «Moskvaj Novajhoj» en Esperanto, 50 numeroj de «Cerbe kaj Kore». Tion mi opinias grava. Ĉu mi fieras? Ne, ne fieras, ĉar ne estas fieristo, tamen kontentas, ke mi sukcesis tion fari, trovis la ĝustan vojon. Certe, multaj samideanoj helpis al mi en tiuj iniciatoj.

4. *Vi estis kaj organizanto de la movado, kaj kultura aganto (esperantigis teatran grupon, redaktis revuojn, tradukis, verkis poemojn kaj librojn). Kiu flanko de via agado estas por vi pli grava – ĉu organiza aŭ krea?*

Por mi estas pli gravaj la konkretaj faroj, utilaj por nialanda E-movado.

5. *Vi verkis multe da poemoj originale. Ĉu estas iu, kiun vi mem plej ŝatas, kaj emas, ke ĝin konu vasta publiko?*

Mi faris kelkajn provojn poeziumi, komprenis, ne tuj, ke la penoj vanas, ke ne indas persisti, do jam pli ol 20 jarojn mi ne verkas poemojn. La librojn mi verkis, ĉar sentis bezonon rakonti pri kelkaj epizodoj en nialanda E-movado, pri kiuj neniuj sciis. Por iom diversiĝi la temon, mi rakontis ankaŭ ion el mia vivo kaj el miaj tradukistaj spertoj en landoj arabaj.

Ĉi kune mi konsentas prezenti specimenon el la antikvaj provoj.

EN URBO FABELA¹

En urbo fabela, en urbo antikva,
En kiu kalifis Haruno Raŝido,
Sencele mi vagas laŭ strato oblikva,
Martelas pavimon per paŝa rapido.

Subite mi vidas – en strata malpuro,
Mezdense de kruroj, pasantaj pretere,
En vesto ĉifona malgranda figuro
Kun man' etendita sterniĝis surtere.

Pasas kruroj, cent kaj mil,
Preteriras kun trankvil',
Kuşas tere la figur'
Inter kruroj, en malpur'...

Etulo sendoma, infan' almozulo
Rigardas al homoj kun peto silenta,
Kaj strias en lia rigard' respegulo
De l' homa rivero inunde torenta.

Pasas homoj sen hezit'
En la don-evita glit'.
Paŝas homoj sen atent'
Al mizer' kaj muta plend'...

Je multaj aromoj plenplenas la strato,
Tintadas moneroj dum vendo-aĉeto,
Kaj kuŝas infan' en dolora malsato,
Dum ie turmente odoras kotleto.

Kuşas tere la infan'
Kun almoz-petanta man',
Pasas homoj sen kompat'
Al doloroj de l' malsat'.

En urbo fabela, en urbo antikva...

/03.1974, Bagdado/

¹ Mi verkis tiun ĉi versaĵon, ĉar mem almozumis infanaĝe dum la milito.

RA-13

Renkontiĝo de Amikoj

2018-07-24/31

Ĉi-jara renkontiĝo proponas trankvilan ripozon ĉe la maro en belega arbaro je 140 km de Novosibirsko. La programo tamen estos abunda kaj ne enua! Bonvenon!

La loko vere indas viziti. Arbaro, maro, plaĝo, boatoj, tenis-korto, lignofajro. Venu kaj ĝuu! Krom tio vin atendas E-kursoj kaj diversaj metiejoj. Ankaŭ prelejoj kaj vesperaj amuzajoj.

Pli detale:

Bazejo Bluamaro (Синеморье)

Loĝado: unu tagnokto kun manĝo en la mendita ejo kostas 1800 rub. Vi povas trovi la informon en la retpaĝo de la bazejo: <http://s88.sinemor.ru/>


Vi povus elekti aliajn loĝkondiĉojn, vidu en la retejo supre.

Aliĝkotoj:

ĝis 01.05 - 800 □, ĝis 15.06 - 1000 □, poste 15.06 - 1300 □. Rabatoj por infanoj ĝis 14 - 200 □. La kotizo estas persona, ne transdonebla kaj neredonebla, eĉ en kazo de nepartopreno en la aranĝo.

Bonvolu sendi viajn kotizojn al la sekva konto:


La ricevanto: Arbekova Ekaterina Aleksandrovna La konto en Sberbanko: 4081 7810 0440 5213 1369 (Арбекова Екатерина Александровна Счёт в Сбербанке: 4081 7810 0440 5213 1369 Сибирский банк ОАО Сбербанк России БИК 045004641 корреспондентский счёт 30101810500000000641 ИНН 7707083893 КПП 540602001 или на карту Сбербанка 4276 8440 2944 0666



Eventoj

Lingva festivalo en Minsko

Minska televidkanalo ONT publikigis la sekvan materialon kun la titolo: Festo de poliglotoj:



Minska festivalo de lingvoj kolektis ĉirkaŭ du mil homojn. Tion sekvas la teksto:

Multlingvismo savos de maljumeĉo – tio estas pruvita de la finnaj sciencistoj. Kaj estas kontrolata praktike de la organizantoj de la Minska lingva festivalo.

En aŭditorioj de la ĉefa universitato de Belorusio 90 volontuloj konatigas publikon

kun 55 lingvoj de la planedo: de la albana, kiu ne havas proksimajn parencojn, ĝis la universala Esperanto, inventita de nia samlandano Ludvik Zamenhof en 1887. Aparta bloko en la festivalo estas dediĉita al Belorusistiko. “Belorusa literaturo: ĉu granda aŭ malgranda?” – la respondo al tiu demando donas fama verkisto Olgerd Baĥareviĉ. La unua simila forumo okazis en 1995 en Francio. La estafeton prenis Rusio, Usono, Venezuelo. Minska lingva festivalo ne havas statuson de internacia, sed ĝi jam estas agnoskita kiel la plej granda en USŜ. Samtempe en la filologia fakultato de la Belorusia Ŝtata Universitato pasas ĝis 18 prezentoj. La lecionoj daŭras po 45 minutoj.

http://ont.by/news/our_news/prazdnik-poliglotov-minskij-festival-vazikov-sobral-okolo-dvyh-tisyach-chel Телеканал ОНТ

Aldone: En la LF partoprenis Irina Gonĉarova, kie ŝi havis du prezentojn de Esperanto en superplenaj klasĉambroj – sume ne malpli ol 80 homoj.

11-a Mezorianta Esperanto-kunveno.



La 30-an de marto – 6-an de aprilo en Maroko okazis la 11-a Mezorianta Esperanto-kunveno. Ĝi konsistis el du partoj: prelegaj tagoj (la 30-a – 02-a) kaj ekskursaj tagoj (la 03-a – 05-a). Mi ne atentis informon pri preciza nombro de la partoprenintoj, sed proksimume estis eble 30 homoj. El Rusio partoprenis du homoj: Tatjana Loskutova kaj mi.

La ĉefa valoro de la vojaĝo por mi estis konatiĝi kun la lando, pri kiu mi antaŭlonge revis. Maroko antaŭlonge estas unu el la plej logantaj min landoj. Pro tio, eksciinte antaŭ jaro pri la planata aranĝo tie, mi sen duboj decidis uzi tiun ĉi pretekston por viziti Marokon. La vizito pasis tute sukcese, la lando vere estas ĉarma, kaj mi tre ĝojas pri efektiviĝo de tiu deziro.

Iom pri la aranĝo. La ĉeforganizanto de Mezoriantaj Esperanto-kunvenoj estas Renato Corsetti. La kunvenoj okazas ĉiujare en diversaj mezoriantaj landoj. Bedaŭrinde, ne en ĉiuj landoj estas organizkapablaj lokanoj, pro tio en iuj landoj (onidire) antaŭe la kunveno pasis perfekte, ekzemple en Turkio, sed la ĵus pasinta kunveno en Maroko tre lamis organizflanke. Grandan pezan parton de organizaj momentoj surpris homoj, kiuj



dekomenca venis por simple partopreni: tio estis Marko Meničetti, kiu faris la tutan kasistan laboron kaj Tatjana Loskutova, kiu aktive kunorganizis la ekskursojn. Do, ĉion, kion ne faris organizantoj, devis fari volontuloj el partoprenantoj. Mi tamen tute ne estis ĉagreniĝinta (fakte, mi anticipe preskaŭ certis, ke la organiznivelo estos ĝuste tia), ĉar mi ja venis por la lando, do mankoj de la aranĝo por mi estis tute neglekteblaj. Krome, mezorientaj kunvenoj havas grandan avantaĝon: homojn. Ili venas el multaj landoj kaj kreas bonan esperantan medion. Mi ĝojis renkonti malnovajn konatojn, kun kiuj konatiĝis pasintjare dum MEK en Kartvelio.

El la prelega parto de la aranĝo memorfiksiĝis la jenaj eroj: medicintemaj prelegoj de Eduard Kusters kaj Frank Lappe, prelego de Tatjana Loskutova pri la trasiberiaj karavanoj kaj montrita de ŝi bonega filmo pri la lasta karavano, spektaklo de la internacia dueto Verda Banano, prelego de Mireille Grosjean pri limoj. Partoprenis la kunvenon ankaŭ Stefan McGill, kiu rakontis pri AMo-seminarioj.

Sekvis la ekskursaj tagoj. La unua ekskurso estis al akvofalo sur la rivero Urika apud setlejo Seti Fatma en la monta regiono Alta Atlaso.



Dum la dua ni veturis al bordo de Atlantiko, al la kurorta urbo Esaŭiro. Du tiu tago la vetero provizis fortan venton, pro kio la oceano paradis per grandegaj ondoj.

La lasta ekskurso denove estis al akvafalo, ĉi-foje la plej granda en Maroko kaj en la tuta Norda Afriko akvofalo Uzd.

Necesas ja diri, ke la kunveno pasis en ekologia vilao apud la granda urbo Marakeŝo. Do, dum la aranĝo ni sukcesis bone konatiĝi kun tiu ĉi fama antikva urbo. Post la kunveno mi havis kelkajn liberajn tagojn

antaŭ reveni hejmen. Mi dediĉis ilin al vizito al aliaj du urboj: antikva ĉefurbo de Maroko — Fes kaj la moderna ĉefurbo — Rabat. Kompreneble, la tempo tute ne sufiĉis. Mi volus resti plu, havi multajn tagojn en multaj urboj kaj iam reveni denove.

Aleksandr Lebedev

Klubo de instruistoj

Programo de Esperanto-kurso

La vorto programo devenas de la greka vorto “πρόγραμμα”, konsistanta el la prefikso “pro” – “antaŭ” kaj la radiko “gramma” – “skribaĵo”. En “Nova vortaro de la rusa lingvo” de T.F. Jefremova “programo” havas multajn signifojn, inter kiuj la bazaj estas “plano de laboro kaj aro da procedoj necesaj por efektivigo de laboro”, sed en la pedagogia sfero ĝi signifas kutime “koncizan prezenton de instruobjekto, kurso, lernolibro ktp.” Programo de lingva kurso estas instruplano, kiu baziĝas sur la teorio de instruado kaj lernado de fremda aŭ gepatra lingvo.

La moderna lingvoinstrua programo devas evoluigi lernantojn, esti orientita al realaj instruistoj kaj lernantoj, esti fleksebla kaj libere adaptebla al konkretaj kondiĉoj, celi realan kurson kaj konkretan lingvonivelon, prezenti parametrojn de la instrua procezo kaj esti instrumento de kontrolo kaj testado, stimuli kreemon de lernantoj kaj instruistoj.

Aktuale en la didaktiko ekzistas tipaj kaj aŭtoraj programoj de lingvokursoj. La tipa programo servas kiel ĝenerala orientilo, dum la aŭtoraj programoj estas akorditaj kun konkretaj instru-metodikaj kompletoj de lingvokursoj aŭ lernolibroj. La popularaj haveblaj lernolibroj de Esperanto por rusianoj ne prezentas programon de aŭtoraj kursoj perataj de ĉi tiuj lerniloj. La lernolibroj “Internacia lingvo Esperanto: plena lernolibro” (3-a eldono) de Boris Kolker, “Esperanto? Ĝi estas facila!” (4-a eldono) de Abdurahman Junusov entenas koncizajn antaŭparolojn, kiuj nur skize prezentas principojn de la lernolibroj kaj sugestas al kursgvidantoj kaj lernantoj ĝeneralajn metodikajn alirojn al la instruata kaj studata materialo.

Ankaŭ gvidantoj de movadaj kursoj, uzantaj proprajn instrumaterialojn, ne pretas nek emas verki laborprogramon de siaj kursoj aŭ ne konsideras ĝin grava kaj bezonata elemento de instrua procezo. Alia kaŭzo de tia indiferenta sinteno al la programo flanke de movadaj kursgvidantoj fontas el tio, ke movadaj kursoj respektive iliaj programoj ne bezonas ies oficialan aprobon, ĉar ordinare kursoj estas mallongdaŭraj kaj ofte okazas ne ĉe edukaj institucioj. Male la oficialaj lernejoj aŭ superlernejaj kursoj de Esperanto de ajna nivelo, eĉ kun ilia fakultativa kaj nedeviga stato, ne rajtas funkcii sen aprobo de la kursoprogramo kaj individua instruista laborprogramo kun laŭtema instruhoraro, kaj la gvidantoj de tiaspecaj kursoj devas verki kaj konfirmigi ambaŭ dokumentojn ĉe aŭtoritataj kompetentaj establoj aŭ institucioj: (sciencaj konsilioj, instru-metodikaj konsilioj ktp).

Tradicie la programo konsistas el tri partoj: prefaca (klariga) notico; baza enhavo kun proksimuma laŭtema instruhoraro; celataj atingotaj lingvokonoj kaj kapabloj de lernantoj.

A. La prefaca notico povas prezenti Esperanton kiel studobjekton, ĝian lokon sur la lingva mapo de la mondo, ĝian rolon de la helplingvo en la interlingva kaj interkultura komunikadoj, konkretan tipon de la kurso kaj aktualan etapon de ĝia studado: bazan, daŭrigan aŭ fakan kurson, atingotan lingvonivelon: A1, A2, B1, B2, C; instruprincipojn, sur kiuj baziĝas la kurso, celojn kaj taskojn de la kurso; kompetentojn, celatajn rezultojn de la lingvokurso. Ordinare la prefaca notico estas konciza dokumento, reflektanta plej gravajn nuancojn de la kurso.

Inter la plej gravaj principoj, al kiuj fidelu ĉiu kursgvidanto, menciindas ĝeneralaj didaktikaj gvidiloj, sur kiuj baziĝas la moderna lingvoinstruado:

1. Komunik-kogna principo. Lernante Esperanton, la kursanoj evoluigas sian propran kognan agadon por plua apliko de akiritaj konoj kaj alproprigitaj kapabloj en reala komunikado.

2. Principo de orientiĝo al subjekto. Tiu ĉi principo estas ligita kun interesoj kaj bezonoj de la lernantoj, kiuj kune kun kursgvidanto subtenas egalrajtajn subjekt-subjektajn interrilatojn en amika kaj laborakcela atmosfero de la kunagado.

3. Principo de funkcikarakterata instruprocezo. La evoluigo de ĉiuj parolkapabloj efektiviĝas surbaze de kredindaj tekstaj materialoj kaj adekvataj situacioj, kiuj povas riveliĝi en la ordinara komunikado de Esperanto-parolantoj kaj en diversaj sferoj de privata kaj socikultura agadoj.

4. Principo de komunik-situacia instruado. Situacio estas aparta ago-ero, kies enhavo estas fiksita al iu problemo interesa por lernantoj. Situacio funkcias kiel procedo por prezenti novan materialon kaj aktivigi parolkapablojn de la lernantoj, kiuj strebu elmontri kaj plifirmigi siajn iniciatemon, memstarecon kaj respondecon en kunagaj lernotaskoj.

B. La baza enhavo de la kurso entenas informojn pri traktataj komunikaj sferoj kaj instruataj temoj, lingvaj konoj kaj kapabloj, parolkapabloj, fonaj movadaj scioj. Tiun ĉi programparton konsistigas ankaŭ laŭtema instruhoraro. Tre gravas, ke estu prezentitaj:

- komunikaj sferoj kaj temoj de kontinua kaj interaga paroladoj;
- tekstoj,
- komunikaj situacioj;
- instruata lingva materialo;
- evoluigataj parolkapabloj;
- strategioj de aŭtodidakta kaj postkursa lingvo-perfektigo;
- taksado de lingvokonoj. Memkontrolo.

La laŭtema enhavo de la parolado povas varii ĉe diversaj kursgvidantoj kaj en diversaj lernolibroj kaj kursoj. Grandparte ĝi dependas de la tipo de kurso kaj de ĝia celata nivelo.

Temaro de ĉiutaga komunikado: familio, homa korpo, karaktero, geamikoj, manĝaĵoj, sano kaj sana vivmaniero, taghoraro, mono kaj aĉetoj, hejmo, domo kaj loĝejo, vestaĵoj, urbo kaj vilaĝo, bestoj.

Temaro de labor-studa sfero: profesioj kaj laborlokoj, studlokoj, skribilaĵaro, komputilo, fremdaj lingvoj, leciono de Esperanto.

Temaro de kultura sfero: ferioj, festoj, libera tempo, ŝatokupoj, libroj kaj literaturo, muziko, kino kaj teatro, amaskomunikiloj, interreto, vojaĝoj

Temaro de kognita sfero: kontinentoj kaj landoj, patrolando, turismo, naturo, klimato kaj vetero, ekologio, scienco kaj tekniko.

Temaro de esperantologia sfero: Esperanto, simboloj de Esperanto, L.L. Zamenhof, esperantista movado, esperantistaj kongresoj kaj renkontigoj, tradiciaj esperantistaj festoj, Esperanta literaturo, Esperanta muziko, Esperanto kaj interreto.

C. La tria programparto temas pri lingvokonoj kaj kapabloj atingotaj de lernantoj fine de la kurso, pri praktikaj kampoj, en kiuj lernantoj povas apliki alproprigitajn konojn de Esperanto kaj akiritajn parolkapablojn. Pliajn detalojn vi povas vidi ĉe “Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj: lernado, instruado ...”

https://edukado.net/upload/enhavo/dosieroj/ker_printebla.pdf

<https://edukado.net/ekzamenoj/referenckadro>

Ĉiu movada kursgvidanto mem decidas, ĉu li aŭ ŝi bezonas programon por propra kurso, mem elektas formon de la programo: detalan aŭ skizan, mem planas konkretajn strategiojn de sia instruado. Multaj instruantoj de Esperanto verkas nur planon de laŭtema instruhoraro, sed ankaŭ tiu bezonas ja ne sole nombradon de instruataj reguloj kaj afiksoj sed ankaŭ pli vastan kaj pli profesion aliron al definitivaj kursoceloj kaj taskoj, metodoj, rimedoj kaj formoj de la instruado.

Vladimir Opletajev

Dua eldono de fama libro



Ĉe eldonejo "Impeto" aperis nova libro:

Mikaelo Bronŝtejn **Lecionoj por knabo. Noveloj.** Originale verkitaj en Esperanto. 2-a eldono, korektita — M.: Impeto, 2018. — 136 p. ISBN 978-5-7161-0300-9

Respondeca redaktoro Dmitriĵ Ŝevĉenko. Pentristoj Michelle Paumier, Anna Striganova

La unuan eldonon de la novelaro “Lecionoj por knabo” eldonejo “Impeto” lanĉis en 2009 omaĝe al la sesdekjariĝo de Mikaelo Bronŝtejn. La noveloj el la libro ricevis vastan aprobon de la legantoj kaj favoran kritikon; la eldonkvanto estas delonge disvendita.

Kelkaj el-inter la noveloj estis tradukitaj kaj publikigitaj en la angla, franca, rusa kaj sveda lingvoj. Entreprenante la duan eldonon “Impeto”

eliminis la gratulajn paĝojn, ne plu aktualajn, metinte en la novan libron la tekstojn, reviziitajn laŭbezone, kaj multajn ilustraĵojn, kompleze faritajn de la pentristino Michelle Pomier.

Rusianoj povas akiri ĝin en la reta vendejo de la eldonejo <http://lemolibro.ru>

Pri 200 el miloj

Gorecka, Halina; Korĵenkov, Aleksander. *Nia diligenta kolegaro: Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj.* — Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 2018. — 320 p., il. (Serio Scio, №10). ISBN 978-609-95087-6-4

Halina Gorecka kaj Aleksadner Korĵenkov kreis la libron, de kiu oni atendis partan plenigon de vakuo pri ekzisto de la nova “Enciklopedio de Esperanto” – “Nia diligenta kolegaro” (NDK), almenaŭ en biografia parto. Nu, la bezono pri nova Enciklopedio estas grandega, ĉar EdE aperis en 1934, kaj enciklopedi-karakterata “Esperanto en perspektivo” – en 1974. Pri io pli nova kaj freŝa oni treege sopiris! Eĉ se la libro dume ne estas enciklopedio, ĝi tion similas: la artikoloj estas faritaj en enciklopedieca stilo, kaj entenas 200 alfabetorde aranĝitajn biografiojn de esperantistoj. Estas farita grandega laboro, la biografioj estas zorge kompilitaj surbaze de fidindaj fontoj, kun necesaj referencoj. Ĉiuj donitaĵoj el NDK estas kontrolitaj kaj kontroleblaj, kaj ĝi povas servi kiel grava konsultlibro.



Tamen, laŭdante la grandan faritan laboron kaj utilecon de la libro, necesas diri pri du gravaj mankoj de NDK. La unua estas ekstrema *subjektiveco* de la elekto de la nomoj, kiuj ĝin eniris. Tro multaj gravaj nomoj forestas, ofte pli gravaj ol tiuj, kiuj eniris. La dua manko de la biografioj estas troa “*objektivismo*” de la artikoloj, ilia strebo eviti ĉion malglatan, kio atestus ekziston de kontraŭdiroj, kvereloj, skandaloj ktp. Plejparte la veraj homoj aspektas en NDK kiel iuj “sanktuloj de l’ ĉiel”.

Konklude eblas diri, ke jam temas pri ĝermo de la sopirata enciklopedio, kiu vere utilas. . Sed ĝi ankoraŭ ne donas la adekvatan “portreton” de nia komunumo. Por prezenti ĝin, NDK devus havi minimume double pli da biografioj, ol nun estas, kaj ne eviti certajn “tiklajn” temojn.

Por rusianoj NDK aĉeteblas kontraŭ “ridindaj” 1600 rubloj inkluzive sendokoston.

Nikolao Gudskov

Oni pri ni

Ĉiu blekas, kiel scipovas


Artikolo kun tiu titolo aperis en revuo "Znanie - sila", marto, n-ro 3, 2018, paĝoj 108-110, far Tatjana Gromova kun mencioj de Esperanto. La lasta ĉapitro titoliĝas (paĝo 110):

AFRIKA ESPERANTO

[...] Okaze de loĝado en komuna teritorio diversaj specioj de animaloj devas kontakti ne nur parencojn, sed ankaŭ fremdulojn. Tial iuj gravaj por vivado signaloj prezentiĝas kiel siaspeca "Esperanto", kiu adekvate perceptatas praktike per ĉiuj animal-specioj, loĝantaj en la sama loko. [...]

<http://www.znanie-sila.su/>

Legi la artikolojn kaj komenti ilin eblas nur post pago.



Vladimir MININ

Ekzamenoj

KER-Ekzameno-2018

2018-05-19/19



La 19-an de majo en Moskvo okazos KER-ekzameno - la internacia ekzameno pri Esperanto, post kiu ĉiu sukcesinto ricevos imponan Ateston, internacie agnoskitan, en 4 lingvoj. Estas 3 niveloj: B1, B2 kaj C1.

Ĉiujn detalojn vi povas ekscii en:

<https://edukado.net/>, KER-ekzameno.

Ni malfermas la registradon al la ekzameno. La afero estas tre urĝa, preferindas registriĝi ĝis la **25-a de aprilo!**

La aliĝilo estas ĉi tie:

<https://edukado.net/aliĝilo?id=2018RU-MOSK>

Post la registriĝo nepre turnu vin al

Aleksandr Basov (sawasawa@mtu-net.ru), kiu kolektos la pagon pro la ekzameno.

La specimenoj de la taskoj estas en la vK-grupo

<https://vk.com/ker8moskvo>

Ni atendas ĉiujn! Ni garantias, ke vi altigos vian lingvonivelon kaj ricevos maron da plezuro!

Antaŭen!

**S. Smetanina – ĉeforganizanto de KER-sesioj,
I. Gonĉarova – kunorganizanto**

KOTIZOJ de REU por 2018

Laŭ Decido de la Estraro de REU de 25.10.2017

Membri en REU oni rajtas ekde la aĝo 18 jaroj; 14-17-jaruloj rajtas aliĝi kiel kandidatoj kun samaj rajtoj krom voĉdonrajto. Por iĝi membro de REU necesas nepre plenigi kaj sendi aliĝilon <http://reu.ru/aliĝo/eo> kaj pagi koncernan membran kotizon.

1. Individua kotizo – 250 rub. (por ekster-KŜŜ-anoj – 20 eŭroj). La individua membro ricevas elektronikforme membrokarton, Bultenon de REU, Jarlibron de REU kaj aliajn informojn (laŭpete REU sendas la materialojn ankaŭ per ordinara poŝto), voĉdonrajton dum Konferenco de REU, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en REU-aranĝoj.

2. Dumviva kotizo - 20-oblo de la individua kotizo. La dumviva membro ricevas ĉion saman kiel la individua membro dum la tuta vivo.

3. Mecenata kotizo – ne malpli ol 2-oblo de la individua kotizo. La mecenato ricevas ĉion saman kiel la individua membro plus danka mencio en la Bulteno kaj en la asocia retejo reu.ru.

4. Kolektiva kotizo - 200 rubloj por ĉiu aligita membro (la aliĝintaj kolektivoj pagas minimume por 5 aligitaj membroj). La aliĝinta kolektivo ricevas membrokartojn (elektronikforme) por siaj aligitaj membroj, Bultenon de REU, Jarlibron de REU kaj aliajn informojn, voĉdonrajton por siaj aligitaj membroj dum Konferenco de REU, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en REU-aranĝoj.

5. Aliĝkotizo por nova aliĝinta kolektivo, aŭ okaze de realiĝo – 300 rubloj. Unufoje pagata de nova aliĝinta kolektivo. Jam aliĝintaj kolektivoj ne pagas. Nova kolektivo iĝas regiona organizaĵo de REU kaj laŭpete ricevas dokumenton pri tio. Se kolektivo ne pagas kotizojn por aligitaj membroj dum du sinsekvaj jaroj, ĝi poste devas denove aliĝi al REU.

Amiko de REU – senpage. Amikoj de REU ricevas rajton partopreni en REU-Konferenco sen voĉdonrajto, Bultenon de REU en elektronika formo kaj aliajn informojn. Persono, sin anoncanta "amiko de REU", devas plenigi aliĝilon kaj menci sian ekzistantan retadreson.

PAGMANIEROJ

1. Per Sberbank. Al la banka karto **5469 3800 7074 4643**. Tion eblas fari senpere en bankoficejo, per Sberbank-Online, per bankaŭtomato kaj terminalo. <http://sberbank-sbrf.ru/karta-sberbanka/kak-perevesti-dengi-na-kartu-sberbanka-rossii.html>
2. Per Yandex-Denjgi povas pagi al la monujo **41001363815184**, pagmanierojn vidu: <http://money.yandex.ru/prepaid/>
3. Pagi kotizon (post anticipa interkonsento) ankaŭ oni povas persone en Moskvo.
4. Per UEA-konto reua-p (precipe por eŭraj kotizoj).

Bonvolu nepre konsideri, ke samtage kun la ĝiro **vi devas** retroŝte aŭ telefone **informi pri via pago** la kasiston (Aleksandr Lebedev, amikko@yandex.ru , telefonnumero 89853852181). Vi devas informi pri ĝirita sumo kaj nomo(j) de homo(j), por kiu(j) estas destinita la pago. Se vi ne informos nin, **la mono estos konsiderata kiel anonima donaco por la kaso!**



La urbo Ŝujo

Bulteno de REU (BdR) estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo
“RUSIA ESPERANTISTA UNIO”

BdR atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandeĉ.ru aŭ (kaj) Svetlana Smetanina svsmetanina@yandeĉ.ru

Estraro de Rusia Esperantista Unio
